


NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj
publikigas la sesvoja de la Norda Federacio
(aj de la Grupoj)

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France
Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo : 33, rue Marceau
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj
aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro
POSTĈEKKONTO : LILLE 403-50

KODAKS
PHOTO-AMATEURS

CAYEZ

9^{bis}, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements
Stocks de toutes marques
Esperanto parolata

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE
(Fondé en 1860)

Louis BLOT

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres
de luxe et d'amateur
Esperanto parolata

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPETERIE
RELIURE - GRAVURE
Fournitures classiques et de bureau

Librairie du Beffroi

Albums et Timbres pour Collectionneurs
Livres - Insignes Espérantistes

MOREAU-FOURMEUX

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

Roger BRATS

30, Rue Michelet
COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures
Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes
BÉRETS - CHAPEAUX

EDMOND

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

Blanche RAMOUT

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût
Choix de Plantes - Corbeilles
Gerbes et Bouquets

Les Coopérateurs
de Flandre et d'Artois

Toute l'Alimentation
Tous les Vins
Tous les Spiritueux

Poids exact, Juste Prix, Qualité parfaite
Nos succursales sont ravitaillées chaque jour
en Pain, Lait frais pasteurisé
Fruits, Charcuterie, Beurre
VENTE A TOUS

Avantages accordés aux sociétaires :
Ristourne au prorata des achats
(3.194.244 frs répartis pour 1935)
Secours de la Mutualité Coopérative
(naissance, maladie, décès)
Journal gratuit tous les 15 jours
Dans nos 450 magasins, vous trouverez
la qualité que vous cherchez
les prix qui vous conviennent

Tout l'HABILLEMENT

Hommes, Jeunes Gens
Enfants

AU BON VÊTEMENT

Maison O. ROZEN
17, Rue des Chaudronniers
DUNKERQUE
Esperanto parolata

FIRMO

Georges MAEGHT

Juvelisto - Artobjektoj
9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE
Esperanto parolata
Rabato al niaj Samideanoj

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO ★ INSTRUADO ★ AKTUALAĴO ★ LITERATURO
PROPAGANDE ★ ENSEIGNEMENT ★ ACTUALITÉ ★ LITTÉRATURE

Kopiraĵo de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj scilgojn oni devas sendi nur al tiu adreso : C. VERNAY, MALO-LES-BAINS (Nord). Ni ne resendus la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — *Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.*



Profesoro J. VANVAERTS

Honora Prezidanto
de la Esperantista Federacio de Norda Francujo

Profesoro VANVAERTS

D-ro J. VANVAERTS, kirurgisto, bone konata de multaj esperantistoj, estas altvalora kuracisto. Dum sia studado, li estis interuulo en parizaj malsanulejoj kaj honorita per ora medalo. En la Fakultato en Lille, li iĝis estro por la praktikaj operaciaj laboroj, agregaciulo de akuŝado, profesoro de operacia medicino, lne profesoro de infama kliniko. En siaj intersekvaj postenoj, li vidigis tute taŭga, ŝatita, amita de siaj lernantoj. Li estas scienculo, edukisto kiu ĉu parole, ĉu skribe, kapablis profitigi siajn disĉiplojn je siaj preskaŭ universalaj konoj.

Sed la scienca vidpunkto ne sufiĉis al li. De longe, de ĉiam, li penadis por defendi la profesiajn aferojn kaj dediĉis sin senkalkulante al tiu devo. Antaŭ la milito, prezidanto de la kuracista sindikato de Lille, li iĝis poste prezidanto de la Norda kuracista federacio de la francaj sindikatoj. Oni ne povas imagi kiom da kompetenteco, agemo, sindonemo, eĉ leĝa scienco postulas tiu rolo kiu ne ĉiam estas rekompencita per dankeco. Li estas vere taŭga viro sur taŭga loko. Li neniam ripozas, li estas nelacigebla, oni demandas sin kie li trovas sufiĉan tempon por manĝi kaj dormi.

En siaj kunfrataj interrilatoj, li aspektas afabla, servema, kunligante firmecon kun ĝentileco. Li lasas nenion leteron senresponda. Fine oni povas konsideri lin kiel modelon, kuraciston tute indan de tiu nomo.

Al animo tiel agema, tiel sindonema, Esperanto ne povis resti indiferenta.

Tial, de longe, D-ro Vanvaerts aliĝis la movadon, entuziasmigita pro la servoj kiujn ĝi povis havigi al la homaro. De la jaro 1924 ĝis 1930, li estis Prezidanto de la Norda Esperanto-Federacio, kies Honora Prezidanto li estas. Komprenoble, li turnis sin al la medicina fako. Ofte, oni vidis lin ĉe la internaciaj kongresoj, en la kuracista sekcio, kie lia aŭtoritateco vidigis nediskutebla. Pri la medicinaj verkoj li de longe okupadis sin, kunlaborante akurate al la T.E.K.A. (1), al la Gazeto I.M.R. (2) kies ĉefredaktoro li estis kaj kiu havas korespondantojn en multaj landoj. Estas juste aldoni ke en tiu tasko li estis eĵike helpata de Doktoro Briquet, eksprezidanto de la Esperantista grupo de Armentières, fervorega kaj lertega esperantisto kiu komponis kaj eldonis medicinan vortaron, rezulton de daŭra, persistema laboro.

Preskaŭ certe, P-ro Vanvaerts ĉeestis la Esperantan Konferencon en pariza ekspozicio, en la scienca parto. Pri la disvatigado de nia lingvo en la kuracista medio, li havas iajn ideojn en la kapo kaj espereble lia agado havigos al ĝi gravan antaŭenpuŝon.

Resume, Profesoro Vanvaerts estas por Esperantismo grava apogo. Estus dezirinde ke troviĝu multaj tiaj pioniroj por la sukceso de nia idealo.

DOKTORO PAUL DESMOULIN.

(1). T.E.K.A.: Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.

(2). I.M.R.: Internacia Medicina Revuo.

ESPERANTO

la interpopola ponto

Estas tempo konstrui pontojn. Pontojn, kiuj kondukas de homo al homo, de popolo al popolo. Sed, kial devus la pontoj esti konstruitaj, se la homoj ne povas interkompreniĝi, se mankas ankoraŭ la sento de la komuneco.

Cu povas interkompreniĝi Italoj kaj Rusoj, se la Italo ne parolas ruse kaj la Ruso ne parolas itale. Por kio utilas al ili ilia kono, iliaj alproksimiĝprovoj, se mankas al ili la unueca lingvo. Se ni volas konstrui pontojn — kaj ni devas konstrui ilin, ni devas antaŭ ĉio forigi la barojn. Kiuj estas la baroj? La multaj lingvoj, kiuj estas ŝtirigitaj kiel muroj inter popolo kaj popolo. Sed la baroj povas esti forigitaj nur per unu: per mondhelpingvo, per dua lingvo por ĉiuj, kiuj ne volas forpuŝi tiun rolo de la popolaj lingvoj, per Esperanto.

Kial koncernas nin Esperanto? oni demandas ŝultroskuante. Sed ĉu fakte Esperanto nenion devus koncerni? Cu verema kultura homo devas demandi kiel koncernas min la hemio, la fiziko, la pacproblemo, la kulturaj klopodoj, krei novajn vivkondiĉojn post la milito? Kaj tamen oni demandas: Kial koncernas nin Esperanto? Cu Esperanto ne aspiras nur ion grandan kaj valoran por nia kulturo? Cu ne ekkonis jam la gvidantaj viroj la neceson de Esperanto? Kaj tamen diras ankoraŭ multaj: Esperanto estas malviva lingvo, nenia organismo sed la nacia lingvo estas vivanta organismo.

La koncepto « organismo » estas de ĉiuj tiuj, kiuj vidas en la lingvo organismon false klarigata. Unu el la plej obstinaj kaj miopaj kontraŭuloj de Esperanto, la konata Hugvisto Fritz Mauthner ja mem konfesis: « Oni misuzas la bildon, ke la lingvo estas organismo, ĉar se tiu vorto ĝenerale devas havi sencan, tiel devas ja ĉio, kio volas esti organismo, esti unuaĵo, kiu per si mem, kvazaŭ sola povas vivi ».

Se do la lingvo estas neniun organismo, neniun unuaĵo, kiu povas vivi per si mem, kiel oni ne povas krei artan lingvon, konscie de unuopa homo? Homo ne povas krei la vivantan ĉevalon, sed la aŭtomobilo, kiu plenumas la taskojn de la ĉevalo, estas la verko de la homa inventemo. Cu oni ne uzas la aŭtomobilon, ĉar ĝi estis « arte inventita » de la homo?

Homo ne povas krei sunlumon, sed la elektra lumo estas homa verko. Cu oni lasu la elektran lumon, ĉar ĝi ne estas « natura »?

Natura, arta! — frazoj, nenio alia — nur frazoj!

Ne estas grave ĉu natura aŭ arta, sed ĉu estas bona, utila kaj taŭga. Aŭtomobilo estas utila kaj taŭga, do ĝi estas bona. Esperanto pruvis sian utilecon, ĝi volas esti interkompreniĝilo kaj ĝi estas tia. Ĉiu propagandvespero montras la vivopovon de Esperanto. Tie, kie du Esperantistoj interkompreniĝas en la lingvo Esperanto estas solvita la problemo de la mondhelpingvo. La « Perpetuum mobile » ne estas eltrovita ankoraŭ ĝis la hodiaŭa tago. Tamen oni legu « Perpetuum mobile » de Dirks kaj oni faros al si klaran bildon pri la plej diversaj provoj, krei « Perpetuum mobile ». Se ekzistus nur unika « Perpetuum mobile » la pruvo de ĝia ebleco estus alportita en unu momento. Sed neniu unika fakto ekzistas. La unua direktebla aerŝipo montris, ke Zeppelin estis prava kun siaj teoriaj konkludoj.

Ĉiuj teorioj pri Esperanto estus senutilaj, se neniu Esperanto ekzistus. Sed Esperanto estas kaj vivas. Oni ne nur parolas pri Esperanto, sed oni ankaŭ parolas en esperanto. Kaj tamen oni ankoraŭ ne ĉie trovas la komprenon por Esperanto. Ankoraŭ oni diras maldekstre: Esperanto estas utopio; ankoraŭ oni diras dekstre: Cu oni povas enkonduki Esperanton en la popollern-ejojn? Kaj dekstre kaj maldekstre parolas homoj pri Esperanto, kiuj neniam okupiĝis pri Esperanto serioze kaj ĝisfunde. Kiel vi prijuĝas homon, kiu sen kono de hemio volas paroli pri ĝi?

Sed oni parolas kaj mortjuĝas pri Esperanto, sen kono de Esperanto. Kaj tio ŝajnas fariĝi modo inter la kontraŭuloj de Esperanto.

Dr. August MILDWURF,
el Wien.

PENSOJ

Ni ne konsentas kun iu ajn reĝimo, kiu limigas personan liberon kaj esprimon de homa prudento.

EINSTEIN A.

La famo estas danĝera por tiuj, kiuj ĝin dumvive atingas, senbezona ĝi estas por mortintoj, sed plensignifa ĝi estas por la idaro, — sanktaĵo, super tomboj de martiroj ĝi transdonas al ni flamantan standardon kaj ne sufokeblan torĉon de bona kaj venka ideo.

FOSCOLO.

CONGRÈS

de la Fédération du Nord

LE 2 MAI 1937

Le Groupe Espérantiste d'Amiens aura l'honneur de recevoir, le 2 mai 1937, le Congrès fédéral.

Depuis 1910, date du dernier Congrès dans notre ville, bien des pionniers ont disparu. Mais il en reste encore quelques-uns et il seront heureux de se joindre aux nouveaux adeptes pour souhaiter la bienvenue aux hôtes que nous souhaitons nombreux.

Amiens mérite une visite. Vous en trouverez une description dans la feuille éditée avec la collaboration du Syndicat d'Initiative.

Le programme du Congrès n'est pas encore exactement fixé au point de vue horaire ; néanmoins, il comprendra, comme à l'ordinaire : session d'examen, séance de travail, banquet, visite de la ville, partie récréative.

Des réductions de prix seront demandées à la Compagnie du Chemin de fer du Nord et des chambres seront retenues pour ceux qui en désireront.

Donnez-nous au plus tôt votre adhésion : vous nous faciliterez ainsi la tâche.

Donc, au 2 mai prochain, la satisfaction de nous grouper, nombreux, sous l'étoile verte.

A. COLLÉATTE,

Présidente du Groupe
Espérantiste d'Amiens.

ADHÉSION : 5 francs en timbres, mandat-poste ou chèque postal à :

M^{lle} COLLÉATTE, 17, rue Le Monnier, à Amiens (chèques postaux : Lille, 456,21).

Nordfranca Esperantisto

por vivi bezonas vian helpon

ABONU ĜIN

ABONIGU VIAJN AMIKOJN

VARBU MULTAJN ABONANTOJN !

Okaze de la Federacia Kongreso Nf. E. kaj Iniciativa Sindikato prezentas al vi :

AMIENS

Prefektejo : 90.211 enloĝantoj.

Preĝejoj : katolikaj, protestantaj kaj izraelidaj.

Gastronomiaj specialaĵoj : anas, pasteĉo, amiensaj tegoloj, makaranoj.

KATEDRALO.

Di-patrina Ĉefpreĝejo estas unuanime konsiderata kiel la plej kompleta, la plej harmonia el la grandaj religiaj konstruaĵoj de Francujo. Ĝi ŝuldas la purecon kaj unuecon de sia arkitekturo al la rapideco de sia konstruado : la plano de genia majstro Robert de Luzarches estis plenumita en malpli ol tri kvaronoj de jarcento, de tiam XIII^a jarcento en kiu la gotika arto atingis sian apogeon.

Ĝi estas la plej granda preĝejo en la mondo kiu estas 145 metrojn longa kaj havas 8000 metrojn da supraĵo ; ĉar ĝiaj volboj estas fermataj de la impresiga alteco de 42 metroj, ĝia volumeno atingas 200.000 kubmetrojn.

La fasadoj de la plejmulto de katedraloj estas « libroj » en kiuj per bildoj kaj simboloj estas esprimitaj la ĉefaj instruoj de la religio, nenie ili estas tiom multaombraj, tiel metode ordigitaj kiel ĉi-tie. Multaj el tiuj statuoj, reliefoj kaj rondaj bareliefoj estas ĉefverkoj : granda estas la famo de Bel-Dio, de Sankta Firmeno, de « Orumita Virgulino », de la grupoj de la Anunciacio, de la Vizitacio kaj de la Prezencio ĉe la Templo.

Ĉiuj jarcentoj depost tiam de la konstruado kunlaboradis en la interna ornamado kaj en la mebligado de la katedralo : altaroj, katedroj, kradoj, tombuoj, el kiuj da el bronzo de la XIII^a jarcento, la solaj en Francujo, kiuj ne estis jetitaj en fandujon dum la Revolucio. La partopreno de la unua duono de la XVI^a jarcento, de la epokoj de Ludoviko la XII^a kaj de Francisko la 1^a, estis la plej grava kaj la plej valora : tiam estis skulptitaj aro da grandaj ŝtonaj reliefoj kaj precipe la mirindaj sidfakoj, kiuj restis netuŝitaj post la danĝero de malkonstruo. Tiuj multaj scenoj — oni povas elnombri 4000 statuetojn — vivo- kaj verecopenaj : la lerteco de artmetiistoj, kiuj sciis el la kerno de kverko elfari por tiu abundega dekoracio malpezajn festonojn, kvazaŭ puntajn rubandojn, la admirinda stato de konserviĝo, faras el tiuj sidfakoj nekompareblan tuton.

MUZEO DE PIKARDIO.

La arkitekturistoj, kiuj ĝin konstruis dum la Dua Imperio scipovis ordigi, malantaŭ honkoncepta fasado, ĉambregojn kie la lokaj antikvaĵoj, la pentraĵoj kaj skulptaĵoj estas prezentitaj sub bonega lumo. Tiuj kolektoj estas sufiĉe riĉaj por ke la Amiensa Muzeo okupu lokon malantaŭ tiuj de Lille, Lyon, Nantes, kiuj estas la plej gravaj el la provincaj muzeoj. Sur la murojn de la granda ŝtuparo kaj de etaĝa galerio estas metitaj ses verkoj de Puvis de Chavannes. La « Pro Patria Ludus » estas sendube la plej kompleta kaj definitiva esprimo de liaj genio kaj maniero. Speciala ĉambrego enhavas kelkajn sufiĉe strangajn pentraĵojn (la plej antikvaj similas al lignaj miniaturoj pentritaj je la gloro de Virgulino por la Amiensa Katedralo). Kun la grava donaco de fratino Lavalard eniris aro da tipaj verkoj de malgravaj holandaj pentristoj kaj kelkaj pentraĵoj rimarkindaj de la XVIII^a franca jarcento de Fragonard, de Hubert Robert, de Lepicic kaj de aliaj.

Pentristo Albert Magnan donacis al la Muzeo sian elektatan kolekton de verkoj de la antikvaj artoj ; ili okupas, speciale por ili konstruitan flankojon. Multaj el tiuj verkoj trovas taŭgan kaj belan lokon en muzeoj : Louvre aŭ Cluny.

MALNOVA AMIENS

kaj ĝiaj KANALOJ.

Malgraŭ ĉiuj vandalismoj kaj postuloj de urbestro, Amiens konservis, ĉirkaŭ sia katedralo aron da monumentoj kaj fasadoj,



atestantaj pri la arkitektura arto de la fino de la XV^a kaj de XVIII^a jarcentoj ; la du « flagrantaj » preĝejoj Saint Germain kaj Saint Leu ; la ligna domo nomata « viro kun tri kapoj » gastejo de « mafeur » de la jaro 1492 ; unu urba pordego el 1531 ; la fasado duon-gotika kaj duon-renesanca de la « maison du Sagittaire » (1592) ; multnombraj konstruaĵoj el brikoj kaj ŝtonoj de la XVII^a kaj XVIII^a jarcentoj, kelkaj kun siaj amuzigaj surskribaĵoj skulptitaj ; la imponaj fasadoj de la « komeredomoj » kie oni vendadis sub Ludoviko la XV^a veluraĵojn, kotonajojn kaj lanaĵojn kaj dum la regado de Ludoviko XVI^a (1780) la fasado de la Teatro kun reliefoj, figuroj de Muzoj kaj faskoj da detaloj kun plej delikata eleganteco.

Inter la publikaj monumentoj, starigitaj dum la XIX^a jarcento oni povas citi (kun la supre-menciita Muzeo) urban bibliotekon de 1826^a kompletigitan en 1895^a, unu el la plej belaj cirkoj de Francujo (1889^a) kaj la Belartan Akademion (1929^a).

La malsupra parto de la urbo ŝuldas la originalecon de sia aspekto al la kanaloj derivantaj de la rivero Somme.

Kelkaj el ili havas la pitoreskan kvaliton de la kanaloj de Bruĝo aŭ de Amsterdamo.

LA PROMENEJOJ ;

LA « HORTILLONNAGES ».

(legu : Hortijonaĵo)

Estas ĉarmaj promenejoj en la urbo mem aŭ en ĝiaj tutproksimaj ĉirkaŭejoj. Apud la ĉefa stacidomo, estas skvaro René Goblet, florita dum pli ol la duono de jaro kaj la komenco de longa duon-rondo de bulvardoj — sur la linio de la lastaj remparoj — borditaj de « malgrandaj ĝardenoj ». En unu el ili estas starigita monumento de Jules Verne apud la domo, en kiu li loĝis dum la lasta parto de sia vivo. Inter la okcidentaj kvartaloj bela parko de la Hotoie estas ĉirkaŭita de la brakoj de rivero Selle kiu provizas per akvo grandan akvuĵon ; najbaro de tiu parko estas anĝla ĝardeno de Malgranda Hotoie. Kontraŭ la plej antikva parto de la civito (kvartalo Saint-Leu), la Kreskaĵo-ĝardeno (le Jardin des Plantes) posedas sur siaj bedoj kaj varmejoj ĉiujn ĉefajn kreskaĵojn utilajn kaj dekoraciajn. Al la unuaj domoj de la orienta parto de Amiens, al kvartaloj Saint-Pierre, de la Vojaroj kaj de la Neuville aliĝas la regiono de la « Hortillonages » naturaĵ insuletoj de la larĝa valo de rivero Somme, transformitaj depost jarcentoj en legomkampoj abunde-fruktodonaĵ. La vizito de « Hortillonages » per boato estas tre agrabla kaj pitoreska.



Ni ! la Komencantoj !

— Kien vi kuras tiel rapide, s-ro Ruĝhar ?

— Ho, bonvolu sen/kulp/igi min, kara Fraŭlino Belkant ! Mi tute ne vidis vin... Bonan matenon ! ĉu vi fartas bone ?



— Bonan tagon, S-ro Ruĝhar, mi estas iomete mal/varm um/inta, la vetero estas vere mal/bel/eg/a, ĉu ne ?

— Ho, jes Fraŭlino ! La norda vento ĉiam blovas kaj la suno ne havas kuragon. Ili certe ne estas esperantistoj !...

— Tute ne, sinjoro, ĉar SE ili lernUS esperanton, precipe laŭ la ĉe-metodo, ili ĉiam estUS agrablaj...

— Kiel vi, kara amikino !
— Silentu, sinjoro, vi ruĝigas min !
— Tia/manier/e, vi estas ankoraŭ pli ĉarma... Jes !

— Ĉu vi nun am/ind/um/as min ?
— SE tio estUS, ĉu vi kolerUS ?
— Hodiaŭ mi ne respondos al vi.
— Kial do ?

— Ĉar vi ne respondis al mia unua demando.

— Kia demando, kara fraŭlino ?
— Kien kaj kial vi kuris tiel rapide kiam mi renkontis vin, antaŭ du minutoj ?

— Ha ! Jes, jes ! mi devas rapidi...
— Mi petas, diru al mi !
— Mi nenion povas rifuzi al vi, tro/dorlot/ita knab/in/eto. Jen ! En la oficejo kie mi laboras, mi havas, momente, pli da laboro ol kutime, ĉar unu kolego estas malsana kaj

PRO la krizo oni ne anstataŭ/ig/as lin, Vi komprenas kien mi kuras... en la oficejon.

KIAL mi kuras ? Estas alia afero. ĈAR mi dezirus esti libera, venontan sabaton POR aŭdi la paroladon de S-ro Verdstel, la mondfama esperantisto.



OKAZE DE TIO, ĉu mi havos la plezuron vin vidi en la urbodomo ?

— Mi ne iros al tiu kunveno, ĉar mi ne estas sufiĉe lerta POR kompreni ĉion kion oni diros. Venontan jaron, mi ĉeestos ĉiujn paroladojn, sed nun, ne. Mi perdus mian tempon mi preferas kudro/ripari miajn ŜTRUMPOJN !

— Kia grava eraro, fraŭlino ! Via lerteco, precize dependas de viaj klopodoj POR kompreni la lingvon. Aŭskultu, mi petas. En la lernejo, kiam la infanoj lernas legi, oni ne legigas nur silabojn kaj vortojn, sed frazojn, eĉ rakontetojn.

Kion vi dirUS PRI knabo kiu parolUS tiamaniere al sia instruisto : « Sinjoro instruisto, ne, mi ne legos tiun-ĉi paĝon, ĝi estas tro malfacila POR mi. »

« Kara infan/et/o, dirus la profesoro vi venas en la lernejon por lerni, ĉu ne ? Kiel vi volas instru/ig/i, ne klopodante POR tio ? »

Fraŭlino Belkant, ĉu vi estus, hazarde, tiu terura infano ? Ne, ne !

Aŭdu, aŭdu ! Vi estas francino, vi bone scias ke la Francoj divenas multajn vortojn (latinajn vortojn) kiam oni parolas esperante ; do, vi povas kompreni la mondlingvon pli facile ol alilandaj personoj. Oftege niaj paroladoj okazas kun lumbildoj. La lumbildoj parolas al viaj okuloj kaj helpas viajn orelojn kaj vian CERBON. PLUE, kiam vi aŭskultas la parol/anton vi al/kutim/igas vian oreilon al la bona el/parol/o, tio estas tre grava ! Far/ig/as en vi mein, sen/konscie, granda laboro

Mi estas lernanto



Kredu min, kara amikino, mi ne povas bone klar/igi al vi tiujn misterajn aĵojn de la « pens/maŝin/o » sed, tamen, mi vidas en viaj okuloj ke vi komprenas kion mi volas esprimi.

— Jes, sinjoro. Mi ne tute bone komprenas, sed mi sentas ke vi pravas.

Kara fraŭlino, kiam vi povas pli/riĉ/ig/i vian vortareton se vi konstante vizitas ĉiujn kunvenojn. Sen/pri/pens/e, vi akiros kelkajn novajn esprim/aĵojn kaj iom post iom venos la deziro kun la ebleco paroli. Kurago venos ankaŭ, vi vidos.

Kaj precipe vi SPIROS en nia ŝatata rondo tiun esperantan aeron kiun vi tiom bezonas POR « verdstele kreski ». Vi pli bone komprenos nian belan idealon !

Ne dubu PRI miaj paroloj, kara fraŭlino, kaj faru same kiel mi, kuru rapidege al via laboro kaj, sabate, venu en la urbodomon.

— Sinjoro Ruĝhar, mi opinias ke vi laboras ĉe advokato, ĉu ne estas ĉe sinjoro Degand ? Eble vi estas « Sankta Johano ora buŝo » ĉar vi tute konvinkis min. Mi tre dankas vin PRO viaj bonegaj konsiloj kaj, mi certigas al vi ke, de nun, vi ĉiam vidos min en ĉiuj kunvenoj.

— NE DANKINDE, kara amikino. Via promeso sufiĉas al mi : PRO tio, mi ĝojas sincere kaj nun, kurage, mi kuras al laboro.

Ĝis la revido, fraŭlino Belkant.

— Ĝis sabate, sinjoro Ruĝhar, kaj TAMEN dankon !



Sabato, post la parolado de sinjoro Verdstel :

« Ho, sinjoro Ruĝhar kiel mi estas kontenta ! Mi preskaŭ ĉion komprenis. Mi ne kredis min tiel kapabla... »

Vere, Esperanto estas facila !

Vivu Esperanto !

ĈIUJ karaj gesamideanoj, multaj el vi similas al fraŭlino Belkant. Kredu ankaŭ sinjoron Ruĝhar kaj venu multnombraj al ĉiu parolado aŭ kunveno POR juĝi PRI via lerteco.

Ĝis revido !...



KLARIGOJ

Mi petas ! Rigardu la klarigojn en la antaŭajn numerojn por kelkaj vortoj.

- Se : si (condition)
- Us : terminaison au conditionnel
- Pro : à cause de
- Por : dans le but de
- Okaze de tio : en cette occasion
- Ŝtrumpoj : bas, chaussettes
- Pri : au sujet de, à propos de
- Cerbo : cerveau
- Plue : de plus
- Spiri : respirer
- Ne dankinde : cela ne mérite pas de remerciements. En français courant : Il n'y a pas de quoi (sous-entendu : remercier)
- Tamen : pourtant, cependant

Ĉar vi estas pli kapablaj, la klarigoj malpli grandigas.

Jen recepto pri

FROMAĜAJ ALUMETOJ

Delikatege bongustaj kun taso da teo aŭ apetitiga likvaĵo, kvankam ili havas tiun kvaliton : esti malmultekostaj.

Batŝaŭmigu samtempe flavajon kaj blankajon de ovo, kun cent kvindek gramoj da faruno, cent dudek kvin gramoj da butero, sesdek gramoj da raspita svisa fromaĝo, sesdek gramoj da raspita « parmesan » aŭ « Chester », unu pinĉpreno da papriko. Kiam la pasto estos homogenega, metu ĝin en tolaĵon kaj lasu ĝin ripozri dum horo. Poste plivastigu ĝin per kukrulilo ĝis ĝi estos duon-centimetron dika kaj tranĉu ĝin en pecetojn dekcentimetrojn longajn kaj centimetrojn larĝajn. Ordigu tiujn-ĉi pecetojn sur plado oleumita kaj kuiru per modera fajro dum ok minutoj.

La alumetoj devas esti svenintaj kaj rostigitaj. Manĝu ilin malvarmaj.

Estas tre facile sukcesi tiun recepton.

Estas bona frandaĵo.

SUKERA ONKLINO.

Henry FORD

kaj lia famkonata pac-krozado dum milita

(de Carl FRANZMANN
Groesbeek (Nederlando).)

Ne tre konata certe estas, ke Henry Ford organizis dum la mondmilito grandan pac-krozadon. Kvankam li aklopodo malsukcesis, tamen la popolo de la stelhava flago interesiĝis multe, ekde, kiel Henry Ford dum mondmilito laboris kiel pacifisto.

Do, estis en la monata Decembro de la jaro 1915. Eŭropo similas al granda, varm-ega forno, diligente hejtita de la diablo proprapersono. Malpaco kaj malamo estis en la mondo. Jam dum multaj monatoj milito furiozis tra Eŭropo. Nuntempaj naŭvuloj demandas: « Ho, kiel estas ebla, kiel estiĝas milito. » Kiel estiĝas milito? Milito estiĝas tiamaniere: Nacia fiereco faras ambicion kaj ambicioj faras pasion al profiteco kaj profiteco faras militon. Jes, pro mono oni militas, per monuloj milito estas direktita, malmultvorte oni povas diri: Milito estas elmonulajo! Fi - elmonulajo!

Kaj la tuta kreitaro suferas pro tiu eltrovaĵo de la diablo. Ankaŭ Henry Ford ekkonis, ke milito estas teruraĵo. La longedaŭra milito konsiderinde malutilis jam al la tutmonda aŭtomobil-industrio. Sekvo: ĝenerala lamiĝo de la mondmerkato. « Ho! estas tempo, ke finiĝu la infera mortigado, alie la homa progreso per unu bato vaniĝas. » Do, kiel praktika aferhomo li decidis en la jaro 1915, organizigi grandan pac-krozadon, celante, fari finon al la malbenita milito. Ĉe Ford similas la ideo ĝis ĝia maturiĝo al infanludo. Jam baldaŭ li kolektis ĉirkaŭe si 165 homojn kun famaj nomoj: por la krozado oni luis grandan ŝipon, nome la *Oscar II* de la Skandinavia-Amerika-Linio kaj jam baldaŭ oni surmariĝis.

Estis grandioza plano. Per grandaj literoj la gazetoj dum tiama tempo dissciigis la novaĵon: Henry Ford, la reĝo de la aŭtomobil-industrio, batalas kontraŭ la milito. Memkompreneble al la tiurilataj komunikoj ne mankis la maldoĉa ironio. Kaj tiuj, kiuj superŝutis la « pacifiston » per sarkasma moko, estis pravaj, ĉar ankaŭ Henry Ford ne kapablis forigi la militon.

Sed apenaŭ oni forlasis la hejnhavenon, kiam jam sur la ŝipo inter la pachomoj estis milito. Oni starigis grupojn, oni apartigis sin, sekrete oni pritraktis ĉiablajn vidpunktojn de la granda problemo: Kio estas la plej bona pacigilo por la malnova Eŭropo? Kvankam Henry Ford ordonis, ke li volas

vidi nenion dumvojaĝe, tamen kun granda zorgoj li observis la evoluon de la pac-krozado. Ĝenis lin precipe, ke la kompetentuloj pritraktis ĉion sekrete, ĉio estis farita en la angulo. In diris, ke tiu vojaĝo al malnova Eŭropo nur estas studvojaĝo. Al proponis, montri per kuraĝa sintenado, ke oni estas seriozaj homoj, ekzemple dum Kristnasko oni enirus la tranĉejojn, postuli de la soldatoj, ke ili ĉesu ilia pafadon. Granda tumulto, tio ne estas ebla. Se ili volas manĝegi unu la alian, tio estas certe ilia privata afero. Kelkaj scienculoj e fariĝis kretpalaj ĉe la pripensado, eniri persone la fronton. Estus ja io krima, fari tion. Kiel oni povus senkulpigi sian infanan agadon antaŭ la kara familio hejme? Estis fakto, ke la vivo sur la ŝipo *Oscar II* dum la pac-krozado ne havis edifan aspekton. Por la tiom multe laŭdita kunuleco de la tuta homaro! Restis nur intriganta kohorto. Kelkfoje okazis ke la disputoj sur la ŝipo fariĝis tiel akraj, ke al Henry Ford ŝajnis, ke ili kvazaŭ volus elgrati la okulojn unu la aliajn.

Kaj dum la tuta vojaĝo ili faris la samon.

Montriĝis la vero de la dirajo: « Kiom da kapoj, tiom da opinioj! » Kapskuante Henry Ford alrigardis la maledifan spektaklon. Montriĝis, ke la tiel nomitaj pacifistoj fariĝis grumbluloj kaj malsimpatiaj koleruloj. Ŝajne ili uzis ilian pacamon nur kiel pretekston, por fari senpagan mondvojaĝon. Estis terura seniluziĝo por Henry Ford kaj li faris kiel praktika aferhomo sian eblon, por kiel eble plej baldaŭ adiaŭigi la tutan socion. Ju pli rapide, des pli bone, ĉar tiam li almenaŭ ne havis pluan malhonoron pro ili.

Tia estis la fame konata pac-krozado de Henry Ford en la jaro 1915.

Ne por la lasta fojo elmontriĝis, ke temas pri tre malfacila tasko, volante kvietigi la malbonan mondon.

Senkulpigo

Pro malsano de nia ŝatata kunlaboranto « FLANDRA ANTIKVAĴO » ni ne povas aperigi en tiu-ĉi numero la kutiman kronikon KURAĜE ANTAŬEN!

Ni petas pardonon al niaj afablaj legantoj kaj esperas kaj deziras kun ili, tre baldaŭan plenan resaniĝon de nia fidela « FLANDRA ANTIKVAĴO ».

La Redakcio.



Ĉiuj en AMIENS
la 2^o de Majo 1937 !...

La Jugoslava Lingvo

Verdire, ne tre taŭgas la titolo de tiu artikoleto, kiun, pli logike, mi devus titoligi: « La serba lingvo kaj ĝiaj ĉefaj dialektoj ». Efektive, ĉiu bone scias ke, en Jugoslavio, lando kie loĝas pluraj slavdevenaj popoloj tri ĉefaj lingvoj estas parolataj: la serba, la kroata kaj la slovena (ne enkalkulante la diversajn dialektojn).

Lau etnografio, la Serboj estas parencoj de Rusoj, Ĉeĥoj, Slovakoj, Poloj kaj Kroatoj. La lingvo apartenas al la slava familio (sudslava grupo) same kiel la kroata, slovena kaj bulgara lingvoj.

Estas ĉ. la 6^a aŭ 7^a jarcento kiam aperis la serba lingvo. Monumentojn kun surskriboj en tiu lingvo oni trovas, kiuj datumas de la 12^a jarcento. Komparante ilin kun aliaj de pli moderna epoko oni povas konstati ke la lingvo ne ricevis multajn ŝanĝojn ĝis la 18^a jarcento.

La kroata lingvo multe similas al la serba kaj oni eĉ povas diri ke tiuj du lingvoj estas dialektoj devenantaj de unu sama patra lingvo. Pli grandaj diferencoj ekzistas inter la serba kaj slovena lingvoj (la slovena parolata de ĉirkaŭ unu miliono da loĝantoj). Cetere, en Jugoslavio, flanke de la multnombraj dialektoj kiujn ni poste rapide citos, Germanoj, Hungaroj, Albanoj kaj Rumanoj loĝantaj en tiu lando, pro cirkonstancoj konsekvencaj al la milito, parolas sian propran lingvon.

Du ĉefajn dialektojn posedas la serba lingvo: la « stokavski-an » kaj la « ĉakavski-an ». La unua estas parolata ĉefe de la Serboj kaj la dua estas uzata de la Kroatoj. Tamen, pli kaj pli la kroataj verkistoj uzas la « stokavski-an » dialekton por skribi siajn literaturajn verkojn.

La « stokavski-a » redividas sin en tri subdialektoj:

La « ekavski-a » uzata en la orienta parto de la serbaj provincoj, kie iom post iom kaj pro ĝia ĉiam pli ofta uzado en la literaturo, ĝi repuŝas kaj anstataŭas la aliajn parolatajn dialektojn. Lau la provincoj, oni ĝin elparolas diversmaniere.

La « ijekavski-a » kiun oni parolas en la suda regiono de la lando, unu el la plej belsonaj inter la serbaj dialektoj; ĝi estas la lingvo uzata por la belaj poemoj kaj la popolaj rakontoj.

La « ikavski-a » parolata en okcidento de Jugoslavio, ĉefe sur la bordoj de la Adriatika Maro kaj sur la insuloj.

Aliaj dialektoj, duonsimilaj inter tiuj, kiujn mi pri parolis, estas uzataj: la « kajkavski-a », inter la Serboj kaj la Slovenoj; la « torlački-a » inter la Serboj kaj la Bulgaroj.

Malgraŭ diferencoj inter tiuj lingvoj kaj dialektoj, malgraŭ la nesimila elparolado de ili, la Jugoslavo sentas unuecon inter si, ĉefe en (kaj pro) la literaturaj verkoj. Ni devas aldoni ke la serba lingvo estas unu el la plej belaj slavaj lingvoj.

ALFABETO. - Por skribi la lingvon, la Jugoslavo uzas du alfabetojn: la latinan kaj la t. n. cirilan.

La Serboj uzas tiun lastan kiel ankaŭ la Rusoj kaj la Bulgaroj, dum la Kroatoj, la Slovenoj kaj la okcidentaj Serboj uzas, same kiel la Ĉeĥoj kaj Poloj, la latinan alfabeton.

La literoj de la t. n. cirila alfabeto estis eltrovitaj aŭ pli bone kopiitaj, lau la greka, de Ciril, aspotolo de la Slavoj, kaj de lia frato Metod, ĉirkaŭ la 9^a jarcento. Antaŭ ĉirkaŭ 150 jaroj, oni plibonigis tiun alfabeton aldonante al ĝi 6 novajn literojn, nuligante kelkajn aliajn neutilajn. Tiu alfabeto, kiu enhavas 30 literojn riprezentanajn la 30 diversajn sonojn de la lingvo, estis uzata ekde la 18^a jarcento de la serbaj verkistoj.

La latina alfabeto, uzata de la Kroatoj kaj Slovenoj, estas adaptita tiamaniere ke ĝi enhavas ankaŭ la saman nombron da literoj kiel la t. n. cirila.

Interesan rimarkon mi faras, sinante tiun tre rapidan ekrigardon pri la serba lingvo: same kiel en Esperanto la regulo estas: unu litero, unu sono. Parolante la lingvon oni prononcas ĉiun literon kaj konsekvence oni skribas kiel oni parolas.

Claude VERNAY.

Vivo de la Grupoj

*

ABBEVILLE. — *Les cours ont repris la seconde semaine de décembre. Ils ont lieu tous les vendredis soir, dans une salle mise à notre disposition par le directeur de l'École de garçons, rue Saint-Jacques. Ces cours qui sont toujours professés par M. Odon Leblond se sont enrichis d'un cours de conversation pour les anciens. L'année se présente donc meilleure que la précédente; nous avons des éléments enseignants qui nous manquaient.*

AIRAINES. — La 31^{me} de januaro, F-ino Gertrud Hansen vizitis nian grupon kaj faris prelecionon. La prezidanto, S-ro Fréville Pierre gratulis kaj dankis F-ino Hansen.

— **EDZIGO** — Nia grupano Gilbert Delasse, instruisto, edziniĝis, la 28^{me} de decembro 1936 kun F-ino Marguerite Dieu.

Ni gratulas la novajn geedzojn kaj prezentas al ili niajn plej korajn bondezirojn pro ilia feliĉo.

AMIENS. — Nia juna kaj ĉarma dana samideanino F-ino Gertrud Hansen gvidis antaŭ multnombra publiko demonstraĉion lecionon laŭ Cseh-metodo. Tiu sukcesa kunveno estis prezidata de S-ro Plenneau, akademiĉa inspektoro.

La samaj kunvenoj okazis en LONGUEAU kaj en ALBERT. En tiu lasta loko, propagando estis farita de niaj geamikoj S-ro Brunet (Arras) kaj Ges-roj Arnaud (Hénencourt). 80 personoj ĉeestis tie la kunvenon, kies sukceso antaŭvidigas multajn alskribiĝojn al la kurso gvidota de F-ino Hansen.

— **NEKROLOGO.** — Kun granda malĝojo ni ekscis pri la morto la 28^{me} de decembro de nia siŝona samideano, kont-kontrolisto de nia grupo, S-ro Pourchelle, antaŭmilita esper. Kiam S-ro Pourchelle estis militkaptito li korespondis en Esperanto kun S-ro Maetz. Tiam la germana oficiro ankaŭ esperantisto konatiĝis kun li kaj uzis sian influon por dolĉigi al nia samideano la severon de la kaptiteco.

Okaze de tiu kruela trafo la grupo kaj la nordfranca esperantista federacio esprimas al lia filo, ankaŭ esperantisto, kaj al lia familio siajn plej sincerajn kondolencojn.

— Nia grupo funebras ankaŭ pro la morto de nia samideano Ducrocq. Delonge malsana li tamen restis fidela al nia grupo. Antaŭmilite, li ĉeestis la Universalan Esp. Kongreson en Barcelono.

Sincerajn kondolencojn al la familio.

ARMENTIÈRES. — Lu komunuma Administracio tion permésante, nova kurso por komencantoj okazos ĉiudimanĉe, je la 9^a ĝis la 11^a, en la Muzika Akademio, rue Nationale, Armentières. S-roj Byache kaj Decroocq, instruistoj, gvidos la kurson kaj ricevos la aliĝojn.

La aranĝo de esperanta ekspozicio estas decidita; ĝi okazos meze de Februaro.

ARRAS. — La 23^{me} de januaro, en la Komerca Cambro, S-ro Cent faris belan prelegon pri Varsovio, urbo de la XXIX^a Universala Kongreso. Prezidis la kunvenon S-ro Maeke, prezidanto de la grupo. S-ro Stuit afable bonvolis pruntedoni kaj memfunkciigi sian projekci-aparaton montrante interesajn vidaĵojn el Varsovio. La ĉirkaŭ 30 ĉeestantaj geesperantistoj kun granda plezuro aŭskultadis flue elparolatan prelegon.

— La grupo gajnis trian premion ĉe la konkurso « Ch. Boyer ».

AVESNES-SUR-HELPE. — La 14^{me} de januaro post la ĉiusemajna kurso okazis kunveno de la grupo « La Progreso ».

Pro foriro de S-ro Couteaux Raymond, kies dato ne estas ankoraŭ konata kaj foriro de S-ro Mariez Ernest, la grupo elektis novajn komitatanojn kaj novajn gvidantojn. S-ro Azambre, notaire à Maroilles, kiun ni konas kiel fervora esperantisto, akceptis gvidi la kurson kun la helpo latibezone de nia juna samideano S-ro Blanchet, instruisto el Avesnes.

Estas elektitaj aŭ reelektitaj la jenaj gesamideanoj: S-ro Azambre Georges, prezidanto, 7, rue Foch, Maroilles; F-ino Deplanque Andrée, viceprezidantino; S-ro Copin Noël, sekretario-kasisto, rue du Collège; S-ro Blanchet Gilbert, bibliotekisto, 15, avenue du Pont-Rouge.

Membroj: S-ro Mayot René, S-ro Moreau René, S-ino De Luca Geneviève, S-ro Delacueille Emile.

Pri la kurso, nenio estas ŝanĝita, ĝi daŭras en la saloneto de la urbdomo ĉiusemajne je la 20^a, kun 15 ĝlernantoj laŭ la gramatika metodo.

BÉTHUNE. — S-ro Brunet, el Arras, vizitis la samideanojn dimanĉon la 10-1.

Unu lernejestro kaj du instruistoj prenis la afero en manojn kaj nova kurso estis malfermita vendrede la 15-1, en Cours Municipaux, je la 18^a 30. S-ro Brunet revenis kun plej bona impresoj pri la estonteco de tiu grupo, kies gvidantoj estas S-ro Benoist, lernejestro, 9 bis, rue de Lillers, Béthune kaj S-ro Pozière, instruisto, 119, av. Sully

BOULOGNE-SUR-MER. — Dank'al klopodoj de F-ino Bayeux, direktorino de la Knabina Komerca Lernejo, rue Casin, kiun ni plejvarme dankas, nia grupo disponas belan komfortan klason, kie okazas ĉiutage kaj vendrede kurso por komencantoj, gvidata de S-ro Kert. La kurson partoprenas pli ol dudek ĝlernantoj.

— Dimanĉon la 17-1 okazis ĉarma Esperantista festo en la eleganta tetrinkejo « Regina ». Diversaj distraĵoj amuzigis la ĉeestantojn, kiuj mem kontribuis al la sukceso de tiu kunveno per dancoj, deklamado, k. t. p. La salono estis bonguste ornamita per vivkoloraj banderoloj kun verdaj steloj; tion ni dankas al F-ino Pannevin, kiu dum feste agrable surprizis nin per beletaj donacetoj. La ĉeestintoj post la agrable pasigita posttagmezo disiris, esprimante deziron ke tiaj kunvenoj okazu plej ofte.

— Post multaj klopodoj de nia grupo ĉe la Komerca Cambro, ni sukcesis akiri la patronecon de tiu grava institucio favore al la Konferenco, kiu okazos en Parizo dum Pentekosto.

CALAIS. — *Mardi 12 janvier, à 20 h. 30, à l'École primaire supérieure de garçons, M. Henri Clausse, président du groupe esp. « Verda Stelo », a fait une intéressante causerie sur le Congrès Universel d'Espéranto à Vienne. Cette causerie fut suivie d'une démonstration de la langue par M. G. Perrin, secrétaire du groupe. 35 personnes se sont inscrites au cours qui a lieu chaque mardi, à 20 h. 30. Un autre cours fonctionne le mercredi au Collège de garçons, rue Leveux.*

— *A l'Activité Intellectuelle du Calaisais, un cours élémentaire d'espéranto a lieu tous les dimanches, à 11 heures.*

CAUDRY. — Dimanĉon la 10^{me} de januaro en la festsalono de la Urbodomo, okazis parolado de S-ro Centneršver pri D-ro Zamenhof, liaj vivo kaj verko. Kun brilanta vervo, S-ro Cent. scipovis interesiĝi ĉiujn ĉeestintojn — pli ol 50 — anojn de la du Caudry-aj kluboj: « Esperanto kaj Peco » kaj « La Verda Stelo » kies komitato aranĝis la prelegon.

Kun granda intereso, la esperantistoj de nia urbo aŭskultis pri la vivo de Zamenhof, pri liaj vivluktoj, malsukcesoj de la unuaj horoj kaj la maloftaj feliĉaj momentoj. Ni ekscis kiel honkora estis li, kiun oni povis ankaŭ nomi « la patron de l'mizeruloj » al kiuj li savis vidon kaj eĉ vivon.

Tre emociita la preleganto finis sian paroladon, deklamante la faman poemon de nia majstro *La Vojo*.

La komitato de « La Verda Stelo » profitas de ĉi tiu okazo por denove kaj sincere danki nian ĝeneralan sekretarion, kiu tiel afable konsentis honori nin per sia vizito.

La sekretario: F. Depreux.

DESUVRES. — La ambaŭ kursoj bone daŭras. Komence de januaro, ni elektis novan kasiston, S-ro Frammery por anstataŭi S-ro Level, kiu forlasis nian urbon.

DUNKERQUE, MALO, SAINT-POL. — La diversaj kursoj sukcese daŭras. La vintra festo je honoro de Zamenhof belege sukcesis eĉ tro ĉar la festsalono estis tro malvasta por la grandega nombro de la ĉeestantoj (300). Ĉiuj artistoj kaj kunlaborantoj meritas varmajn aplaŭdojn kiujn la publiko ne ŝparis.

— La 18^{me}, s-ano Stuit (el Leeuwarden kaj Arras), tre kortuŝe parolis pri nia majstro Zamenhof.

— La 19^{me} li animis viglan gajan vesperon en la restoracio Trassaert. Per kantado, koncerto, anekdotoj kaj societaj ludoj, tiu vespero helpis interkonatiĝon de la komencantoj kaj la malnovuloj.

— La biblioteko iom pli funkcias; 25 pruntoj de libroj kaj 6 de gazetoj dum decembro kaj januaro.

FRESNES. — Dimanĉon la 17^{me} de januaro dum la kunveno de lokaj ekskunbatalantoj, kiu okazis en nia kursejo en la urbdomo de Fresnes, S-roj Aldebert kaj Carlier prelegis pri la rolo kiun ludas esperanto por la tutmonda paco; sur la muron de la vasta salono estis metitaj propagandaj afiŝoj pri esperanto kaj sur la nigra tabulo S-ro Carlier skribis belajn frazojn pri esperanto kaj interfratiĝo de popoloj.

— Merkrede, la 27^{me} de januaro, S-ro Cent prelegis pri Varsovio kun lumbildo.

JEUMONT. — Fine, oni povas ĝin-ĉi jaron gvidi kurson en Metia Lernejo. Ĝi okazas ĉiulunde de la 19 ĝis la 20^a. La 14^{me} de decembro, oni lernis kaj kantis *La Espero*. Perfekta kurso okazas ankaŭ ĉiusemajne en « Hôtel de la Paix ».

LENS. — *La réunion générale du Groupe Espérantiste Lenois « Zamenhof » a eu lieu à l'École Carnot. M. Max, président sortant, ouvrit la séance et présenta la démission du Comité sortant.*

M. Dubois E. fut élu président de séance. Il remercia le comité sortant pour le bon travail accompli au sein du groupe. M. Vala, trésorier, fit le compte rendu financier pour l'année 1936.

Mlle Poequet Y. donna ensuite lecture du rapport moral.

Il fut procédé à l'élection d'un nouveau comité. Celui-ci s'est réuni et s'est constitué de la façon suivante: Président: M. Max, réélu à l'unanimité; Vice-Présidents: Mme Patalaz, M. Corinberg; Trésorier: M. Vala; Secrétaire: Mlle Poequet Y.; Secrétaire-adjoint: M. Neuville; Délégué à la Presse: M. Dubois; Vice-délégué de l'I.E.L.: M. Corinberg; Délégués à la radio: M. Bryancet; Mme Borenstein.

Ni petas de vi tute malgrandan servon: Varbu unu novan abonanton al nia bulteno, kaj « Nf E. » povos festi sian MIL-an abonanton.

— Esperantista festo organizita la 17-18 gnis grandan sukceson. S-ro Max, prezidanto de la grupo, malfermas la kunsidon. Post la paroladeto de S-ro Dubois, S-ro Stuit kiu gvidis la lastan kurson, rakontas interesan anekdoton. Du ĉarmaj geartistoj Johano kaj Klaudio Vala recitas « En la pluvo ». Poste F-ino Sleder rakontis « Terura sonĝo ». Ges-roj Lenglin ludis teatraĵon « Scivola virino ». Lernanto de S-ro Stuit, per kortuŝaj vortoj, laŭdas kaj dankas la meritplenan profesoron Stuit. Poste, S-ro Macke, prezidanto de Arrasa grupo, montris kelkajn prestidigitatorojn tre interesajn.

La ekslernantoj de S-ro Stuit oferas publike al li belegan donacon. Kortuŝe li respondas. Tiu pleasukcesa vesperfesto finiĝas per dancado, kiun antaŭis grupa fotografado.

LIÉVIN. — La kurso daŭras sukcese ĉiu jande je la 19^h30. Samtempe okazas kunveno por malnovaj lernantoj.

— Jen estas la nova komitato de la grupo: Honora prezidanto, delegito de I. E. L. kaj de Arteza distrikto: S-ro Viseux Léonard; Prezidantino: F-ino Irène de Block; Viceprezidantoj: S-roj Caron Pierre kaj Delion Louis; Sekretario: S-ro Bernard Georges, 9, rue G. Delbecq; Kasisto: S-ro Léon Moelighem; Komitatoj: S-ro Dufhot kaj F-inoj Cadot kaj Moelighem.

— Baldaŭ okazos ekzameno por « Atesto pri Lernado ».

PONT-SUR-SAMBRE. — Nia grupeto gajnis la unuan premion de la konkurso de S-ro Boyer (Caunes). Dum 1936, ni gajnis du pokalojn. (Pokalo « fervorigilo » oferata de nia prezidanto, S-ro Humez).

Eble la tria alvenos !

SAINT-OMER. — Okaze de la naskiĝdato de D-ro Zamenhof, la esperantista grupo organizis, la 17^o de decembro, feston al kiu ĝi invitis siajn amojn kaj la membrojn de la Fotografa Societo.

Post la ludo de la himno *Espero*, S-ro De ligny prelegis pri Zamenhof kaj pri la deveno de la lingvo.

Poste, diversaj distraĵoj tre amuzis la ĉeestantojn: komediato, kino, manlertaĵoj.

